Supra foto: Placo de Almagro. El maldekstro dekstren: Raúl, Juan, Encarni, Miguel, Angelines, José, Arturo, Mati, Pedro, Nando, Mirjam, Sergio, Félix, Sara, Belén (kaj onta esperantido), Pablo kaj... bekkruæo. Fotis Pedro Hernández

Post la teatra¼o ni promenis tra la urbo kaj vizitis la plej gravajn monumentojn, tio estas, la Grandan Placon, la statuon de Diego de Almagro (konkerinto de Æilio) kaj la belege cizelitajn pordornamojn de la almagraj palacoj.

Fineestis farita la komuna foto kun la verda flago kaj ni æiuj disiris. Kelkaj revenis en Madridon, aliaj restis por festi, diboæi kaj dormi en Reøurbo. Pli-malpli je la 4-a ni æiuj fine iris dormi.

Belega semajnfino kaj superba etoso. Mi ege øuis øin, malfeliæe kelkaj invititoj ne povis/volis veni, sed same oni sentis ties mankon.

Arturo Jiménez Carretero
EMAS (Reøurbo)

Jen grupo Grupo Auroro de la Formiga, en Barcelono, montrante la leterojn de "esperanto"



Iberia Renkontiøo 2008

De la 14a øis la 16a de marto okazis denove iberia renkontiøo, en la æe-mediteranea urbeto Benicàssim, post la sukceso en Madrido la pasintan jaron. Æi-foje la organizadon faris Valencia Esperanto Junularo. HEF apogis la eventon per helpo de 150 eýroj. José Rodriguez alportis la subtekstigitajn filmojn kun voæoj en la angla kaj rumana, kiel reprezento de HEJS.

La magistrato ofertis sian helpon: oni disponigis amasloøejon en la sportejo de gimnazio, kie eblis dormi senpage kaj permesis uzi la placon malantaý la loka preøejo.

La unua programero estis enkonduko en la rumanan lingvon fare de Florin Ioan Bojor, juna rumano loøanta en Katalunio, aýtoro de la ¼us-publikigita vortaro rumana-kataluna, kataluna-rumana, la unua ekzistanta. Li prezentis sian vortaron la sekvan tagon.

Sabate okazis mallonga salut-parolado en la urbodomo. Vespere oni muntis tablojn kun aæeteblaj esperanta¼oj kaj flugfolioj.Dume, en lokalo okazis diversaj programeroj: dubo-solvado, debato pri lingvaj rajtoj kaj prelego pri la funkciado de la mono kaj la banksistemo.

En la placo oni povis øui lecionon pri tradicia kanto *cant d'estil,* kaj poste spekti mataæon de valencia pilk-ludo. Sekve estis prezentita la aýtomata tradukilo Apertium.Post la vespermanøo la kantisto JoMo dancigis grandan parton de la publiko kaj poste estis festumado en kafejo. La plej noktemaj iris spekti stelojn en la plaøo.

Dimanæe multaj vizitis la planetarion de Castellón kaj poste la renkontiøo finiøis per komuna vegetarana paelo, malrapide kuirita de Francisco Conejero, sur ligna fajro, kiel bongusta fermo.



2008, Internacia jaro de lingvoj

La Øenerala Asembleo de la Unuiøintaj Nacioj dum kunsido de la 16-a de majo de la pasinta jaro, proklamis solene la jaron 2008 *Internacia Jaro de Lingvoj*, agnoskante ke la plurlingvismo signifas unuecon en diverseco kaj øi celas la internacian komprenon.

Kiel sciate, en la mondo oni parolas proksimume 7.000 lingvojn, el kiuj, laý UNESKO la duono el ili estas en estingodanøero, kaj en la daýro de kelkaj generacioj, pli ol 50% de la lingvoj parolataj en la mondo povos malaperi. Pro tio, por defendi æiun lingvon, grandan aý malgrandan, pli aý malpli konatan, la Unuiøintaj Nacioj (U.N) alvokis la þtatojn por defendi la lingvojn, kaj petas de UNESKO, kiel internacia organizo celanta amplekse pri æiu sfero de la kulturo, ke øi kunordigu la agadon por la Jaro plenumante sian rolon kaj zorgante la aktiva¼ojn tiucelen.

De tiu momento, la UNESKO ekagis kaj konsekvence, øia Øenerala Direktoro, S-ro Koïchiro Matsuura, sendis al la mondo mesaøon pri la celebrado de la Internacia Jaro de Lingvoj, per la slogano "*La lingvoj gravas".* Unu el la celoj de UNESKO estas agnoski, nacie, regione kaj internacie la gravecon de la lingvoj kaj øia diverseco. Krom tio, la lingvoj havas kernan gravecon por atingi la celojn de edukado por æiuj kaj la Jarmilajn Evoluigajn Celojn, aprobitaj de U. N. en la jaro 2000. En tiu senco, laý la eduka vidpunkto, la lingvoj havas strategian rolon en la edukado kaj lernado de kapabloj por la vivo, kaj eæ øi estas faktoro de socia integriøo por scii batali kontraý la malsanoj.

Plie, la kultura diverseco estas intime ligita al la lingva diverseco, kiun UNESCO agnoskis en la *Universala Deklaracio pri Kultura Diverseco de 2001, la Konvencio por la konservado de la nemateria kultura hereda¼o, de 2003 kaj la Konvencio pri la protektado kaj antaýenigo de la diverseco de la kulturaj esprimoj, de 2005.*

UNESKO opinias ke en la daýro de kelkaj generacioj pli ol 50% de la lingvoj parolataj en la mondo povas malaperi, æar ni ilin ne uzas nek en la ciberspaco nek en la lernejoj, ili forestas el la eduksistemoj, eldona industrio kaj komunikaj rimedoj, malgraú tio ke æiu lingvo estas regata de homgrupo kiu øin uzas. Pro tio, por gardi la proprajn lingvojn, UNESKO kreis en 1999 la "Tagon de la patrina lingvo" por festi øin æiun 21-an de februaro, kaj impulsi la defendon de la praktiko de la denaskaj lingvoj, æefe tiuj minoritataj.

La solvo ne estas facila, æar tiu defendo de la diverseco de lingvoj ne estas plenumata nuntempe eæ de la plej gravaj Internaciaj Organizoj. Certe pro tio, okaze de la solena deklaracio fare

de U.N. de la jaro 2008 kiel Internacia Jaro de Lingvoj, la Øenerala Asembleo petis de la Øenerala Sekretario ke li garantios ke æiu lingva servo de la organizo havu la samajn rimedojn, por solvi la problemon de la troa uzo de la angla lingvo, forgesante la aliajn kvin oficialaj lingvoj de U.N., tio estas, la araba, la æina, la hispana, la franca kaj la rusa. Se ni rigardas la Eýropan Union, la problemo estas malsimila, æar leøe la lingvoj de æiu membroþtato estas egalrajtaj, sed oni scias ke la troaj kostoj de la traduksistemo iam endanøeriøas tiun principon, kaj ne æiuj lingvoj estas same uzata. La Komisiono de la Europa Komunumo, per labordokumento de septembro 2007, pri *la aplikado de agadplano por instigi la lernadon de lingvoj kaj la lingvan diversecon"* kuraøigas, unu plian fojon, la eúropanojn regi unu aý du aliajn naciajn lingvojn, la instruadon de la lingvoj de najbaraj nacioj, per specifaj programoj jam ekzistantaj, dediæitaj al la lernejoj (Comenius), al la universitatoj (Erasmus), al la profesia kampo (Leonardo) kaj al la edukado de plenkreskuloj (Grundtvig), agnoskante krome, ke *æiu lingvo estas akceptitaj: la oficialaj lingvoj, la regionaj, la minoritataj, tiu de la inmigrintoj kaj tiu de la æefaj komercaj partneroj".* Kiel oni povas konstati, internacia lingvo tute ne estas konsiderata de la Europa Unio, kaj la lingva problemo daýras kaj tute ne solviøas nek solviøos per tiaj rimedoj. Pro tio nur estas UNESKO kiu iam agnoskas la ekziston de internacia lingvo kaj en la mesaøo de øia direktoro ankaú kuraøigas la lernadon de la naciaj lingvoj kaj petas regi alian nacian aý regionan kaj unu aý du internaciajn lingvojn, æar nur se plurlingvismo estas plene akceptita, æiuj povos trovi sian lokon en nia tutmondiøinta mondo. Pro tio dirite, kvankam en la U.N. ne estas uzataj multaj lingvoj, almenaý, per la menciita rezolucio je la plej alta nivelo, la agnosko de la Jaro de Lingvoj kaj la lingva diverseco, eniras en la internaciajn instancojn, kaj pro tio UNESKO invitas la registarojn, la U.N-organojn, la organizojn de la civila socio, edukajn instituciojn, asociojn de profesiuloj kaj æiujn aliajn koncernatojn, stimuli la respekton kaj protektado de æiuj lingvoj, æefe la plej endanøerigitaj.

Kiel oni povas konstati, internacia lingvo tute ne estas konsiderata de la Eýropa Unio , kaj la lingva problemo daýras kaj tute ne solviøas nek solviøos per tiaj rimedoj.


Esperanto estas internacia lingvo, agnoskita de UNESKO per la fama Montevidea Rezolucio de 1954 per kiu oni agnoskas ke la celoj de Esperanto koincidas kun la celoj kaj idealoj de UNESKO. Se, kiel dirite, la æefa celo de UNESKO estas rekoni, je æiu nivelo, la gravecon de la lingva diverseco, Esperanto grave rolas en æi tiu sfero, ekde la unua Universala Kongreso en

Boulogne-sur-Mer en 1905, æar øia parolantaro estas vere internacia kaj diversa, kun malsimilaj kulturoj, apartenantaj al æiu kontinento, kaj per la lernado kaj parolado de Esperanto, oni havas okazon kontakti kun aliaj vivmanieroj kaj aliaj kutimoj, agante Esperanto kiel pontolingvo inter diversaj kulturoj, æar æiu praktikanto kulture riæiøas reciproke.

Esperanto plenumas perfekte la *universalan deklaracion de UNESKO pri kultura diverseco*, aprobita, unuanime, de la Øenerala Konferenco de 2001, kiu unuafoje konfirmas la respekton al la kultura diverseco kaj la interkultura dialogo kiel unu el la plej bonaj garantioj de evoluo kaj paco. La esperantistoj ofte ne konscias pri la graveco de nia propia mesaøo pere de komuna lingvo kaj ne scias defendi øin. Tamen, laý UNESKO, tiu kultura diverseco kiu Esperanto, certe havas ekde la komenco, estas tiel grava ke øi fiksas laý la jura senco de "*komuna hava¼o de la homaro*" kaj øia defendo kiel "*etika devo por la respekto de la homa digneco*". Pro tio la sama Organizo denove en Parizo 2005 adoptis alian tre gravan tekston, t.e. la *Konvencio por la Protektado kaj Antaýenigo de la diverseco de la kulturaj esprimoj* por ke la membroþtatoj zorgu la plej diversajn kulturajn manifestaciojn. Esperanto, laý tio estas *nemateria kultura hava¼o*, koncepto kiu enhavas la aron de kulturaj aktiva¼oj, nemateriaj, kiel la muziko, la tradiciaj rakontoj, la tradicia medicino, la gastronomio, *la lingvoj*, k.t.p. Pro tio, kiel asertis la eksa Prezidentino de Islando kaj Ambasadoro de Bona Volo de UNESKO, s-ino Finnbogadotir "*Se lingvo perdiøas, la tuta mondo perdas ion, æar kiam nacio aý kulturo perdas sian memoron, same okazas kun la kompleksa teksa¼þo kun kiu teksiøis la mondo*".

M. Rafaela Urueña

Biografio pri Zamenhof en la Reto



Luis Guillermo Restrepo Rivas, inøeniero pri elektroniko kaj universitata profesoro pri artefarita intelekto, sperta kolombia esperantisto, enretigis hispanlingvan biografion pri Zamenhof, verkita de Maria Ziólkowska. Oni povas elþuti øin senpage per la jena ligilo: http://luisguillermo.com/doctoresperanto/

Du kandidatoj por Nobel-premio

Kvankam la probableco ke la premio atingos esperantan verkiston estas preskaý nula, prezenti kandidaton povas helpi diskonigi nian lingvon en amaskomunikiloj . La du æefaj asocioj pri literaturo en esperanto, EVA kaj Esperanta PEN-centro prezentis du diversajn homojn.

La islandano Baldur Ragnarsson estas proponata de Esperantlingva Verkista Asocio (EVA). Li naskiøis en 1930 kaj profesie laboris kiel instruisto kaj æefinspektoro. En la movado, Ragnarsson, interalie, prezidis la *Islandan Esperanto-Asocion*, la *Belartajn Konkursojn* de UEA ekde 1975 øis 1985, kaj la komitaton de la Universala Kongreso de 1977. Ragnarsson interesiøas æefe pri la poezia øenro. Li verkis islandlingve poemojn kaj fakajn librojn pri la islanda lingvo. Liaj plej konataj verkoj en esperanto estas la poemaroj *Þtupoj sen Nomo* kaj *Esploroj*. Li ankaý aýtoris diversajn eseojn pri lingvo kaj literaturo kaj tradukis el la islanda.

En la letero sendita al la Nobel-Akademio, la prezidanto de EVA difinas tiel lian poezion:"Plie ol iu alia vivanta aýtoro, Baldur Ragnarsson influis seme la disvolviøon de moderna kaj fleksebla poezia lingva¼o en la esperanto-literaturo, dank' al reago en lia verko inter la kontinenta tradicio, kun rimo kaj silaba mezuro kiel plej esprimivaj iloj, kaj nordia tradicio, kie aliteracio kaj akcento estas la æefa maniero konstrui poezian tekston. Estas tiu-æi interreagemo kio faras la verkaron decida paþo por la antaýeniro de esperanto de lingvo intencita æefe por ne-literatura komunikado al kompleta natura lingvo(...)

Aliflanke, Esperanta PEN-Centro, ligata al la Esperanta Civito, elektis s-inon Marjorie Boulton per enketo al la abonantoj de Literatura Foiro, el kvar kandidatoj proponitaj de la asocio (Marjorie Boulton, István Nemere, Giorgio Silfer kaj Spomenka Þtimec). Boulton, anglino kiu naskiøis en 1924, verkas en esperanto kaj angle kaj estas doktoro pri angla literaturo. Boulton laboris kiel instruistino kaj estis dum multaj jaroj direktoro de pedagogia ko-legio. Þi þatas æefe ver-sa¼ojn, teatra¼ojn kaj novelojn. Inter þiaj libroj elstaras: *Zamenhof, Aýtoro de Esper-anto*, *Faktoj kaj Fantazioj*, *Cent øojkantoj*, *Eroj* kaj *Virino æe la landlimo*. Boulton kaj Ragnarsson membras en la Akademio de Esperanto kaj estas honoraj membroj de UEA.



Marjorie Boulton (Vikipedio)

Simpozio pri lingvaj rajtoj

La 24-an de aprilo okazis en la Øeneva sidejo de Unuiøintaj Nacioj simpozio pri lingvaj homaj rajtoj, dediæita al la 100-jariøo de Universala Esperanto-Asocio kaj la 60-a datreveno de la Universala Deklaraico de Homaj Rajtoj. Unuafoje simila simpozio okazis 10 jarojn pli frue lige kun la 90a datreveno de UEA kaj la 50a de la Deklaracio. Memorigante pri la iama traktado pri Esperanto æe Ligo de Nacioj en la sama loko, Palaco de Nacioj, prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta atentigis: “En æi tiu loko Francio iam metis sian vetoon kontraý Esperanto. Eble Privat nun kontentus pri ni.”

Bondezirojn por la simpozio sendis la øenerala direktoro de la Øeneva Oficejo de UN, s-ro Sergio A. Ordzonikdze. Li gratulis UEA pro øia jubileo kaj menciis i.a.: “UEA faras signifan kontribuon al la antaýenigo de lingvaj rajtoj en la mondo, precipe pere de sia aktivado subtene al la rajto uzi kaj esti edukata en sia propra gepatra lingvo.”

La estro de la Oficejo de UN por ligoj kun NRO-oj, s-ro Ricardo Espinosa, mem æeestis kaj salutparolis. Mesaøon de la prezidanto de CONGO (komunumo de NRO-j en oficialaj rilatoj kun UN), s-ro Liberato Bautista, peris la unua vicprezidanto de CONGO, s-ino Anna Biondi. La antaýa prezidanto de CONGO, s-ino Renate Bloem, kunprezidis la matenan sesion. Nome de Svisa Esperanto-Societo salutis øia kunprezidanto Didi Weidmann, kiu elstarigis la rolon de la svisa Esperanto-movado kiel akuþinto de la jubileanta UEA. Fine de la malferma solena¼o prezidanto Dasgupta, krom saluti en la nomo de UEA, samtempe faris prezenton pri substancaj lingvaj rajtoj.



Dekstre situas la prezidanto de UEA, Probal Dasgupta. Maldekstre Ricardo Espinosa.
Studio-Pro.ch, Stefano Keller

En la programo estis pluraj prelegoj de eminentaj specialistoj. D-ino Tove Skutnabb-Kangas (Universitato de Roskilde, Danlando) prelegis pri “Lingvo, edukado kaj (rompo de) homaj rajtoj”. Þi aparte emfazis la lingvan rajton de infanoj ricevi edukon en sia gepatra lingvo, kaj la genocidajn situaciojn, kiuj ekzistas, kiam oni

praktike devigas la infanojn de difinita popolo transiri al alia lingvo. La temo de prof. François Grin (Universitato de Øenevo) estis “Interkompreniøo kiel strategio por lingva justeco”. Li pritraktis modelon, pri kiu li nun laboras, por utiligi la inter-kompreneblecon inter lingvoj de la sama grupo en Eýropo por malpliigi la traduk-kvanton kaj samtempe garantii al æiu servon en lingvo, kiun li/þi povas facile kompreni. Kunlaboranto de Grin, d-ro Michele Gazzola prelegis pri “Instruado en universitatoj: la lingvaj gajnoj kaj malgajnoj pro interna-ciismo”. Li traktis la malpozitivajn sekvojn de la troigo de la bezono instrui en la angla en eýropaj universitatoj kaj de la diskriminacioj kontraý esploristoj, kiuj ne verkas en la angla. Kiel reprezentantoj de indiøenaj popoloj en Kolombio, Alasko kaj Æilio, pri ties situacio parolis respektive John Mateo Lopez, ambasadoro Ronald Barnes kaj Flor Rayen Calfunao Paillalef.

En la simpozio partoprenis æirkau 70 homoj el 13 landoj. Proksimume duono estis ne-esperantistoj el diversaj NRO-j. Rimarkinda estis la æeesto de klaso de gejunuloj el svisa mezlernejo, sub la gvido de sia instruistino Mireille Grosjean.

Jam antaý la simpozio ekfunk-ciis øia retpaøharo www.linguistic-rights.org. La paøaro estos plu evoluigata por fariøi atentopunkto por æiuj, kies lingvaj rajtoj estas malobservataj, kaj por ke oni øenerale ekkonsciu, ke esperanto estas rimedo por defendi lingvajn rajtojn.

Financan subtenon por la aranøo UEA ricevis de Svisa Esperanto-Societo kaj Institucio Hodler ’68.

Komunikilo de UEA



D-ino Tove Skutnabb-Kangas. Studio-*Pro.ch, Stefano Keller.*

Internacia Esperanto-Semajno en preparo



La Semajo okazos æi-jare en Salou (Tarragona) de la 4-a de oktobro øis la 11-a. La programo pli aý malpli konsistos kiel en pasintaj Semajnoj. La dimanæon 5-an estos inaýguro kun æeesto de la lokaj aýtoritatoj. Kiel kutime, minimume, estos kvar prelegoj pri diversaj aspektoj æu de la Esperanto-movado, æu pri aliaj temoj de nia æiutaga vivo. Se iu samideano deziras eksponi, konigi siajn kapablojn kiel preleganto, jen þanco por li. Se jes, volu averti la organizantojn kiel eble plej frue.

Oni okazigas du interkonajn vesperojn, kie krom reciprokra interkonatiøo kaj praktikado de nia kara lingvo, vi povos gustumi franda¼ojn æiam “irigaciataj” per bona æampano kaj aliaj refreþigaj trinka¼oj. Esperanto ne estas forgesata kaj æiam oni organizas kursojn kiujn æeestas ne nur komencantoj, sed ankaý gesamideanoj kiuj jam posedas la lingvon (Æiam oni lernas ion). Oni organizos debatojn, kiuj dependos de la disponebla tempo. Por 2008 la æefa diskutado estos Kio okazas kun la interna ideo?

Kompreneble, oni ne forgesos la ekskursojn. Estos organizataj tri ekskursoj eksterurbe. Unu tuttaga, du duontagaj. Alia ekskurso estas por koni la vidinda¼ojn lokajn. Jam de kelkaj jaroj, oni omaøas nian bedaýratan pionirinon s-aninno Ada Sikorska Fighiera kaj donas la samnoman premion. Estas aliaj programeroj. Post la vespermanøo, okazas diversaj kunvenoj. Oni povas spekti operon pere de video-bendo. La labortago komenæiøos post la matenmanøo kaj øi daýros øis meznokte. La dimanæan nokton ni distriøos en la lokaj amuzejoj, kiuj estas multaj kaj tre allogaj.

Inter programero kaj programero, oni havos liberan tempon por viziti la strandon, æar dum tiu sezono en Salou, la vetero estas karesema sen malvarmo, nek varmo. De la hotelo Mediterraneo al la strando oni bezonas, piede, nur dek minutojn.

Laste ni menciu la folkloran feston, kie renoma ensemblo distrigos per bela muziko.

Pli da informo:
http://personales.ya.com/semajno
Luis Serrano tel. (34) 93 727 50 21



Jen bela foto farita okaze de la tertremo okazinta en Æinio, en la Universitato pri Sportoj el Kantono, kiel omaøe al la viktimoj, de la studentaro de la universitato kie lernas

Augusto Casquero

Grava subvencio por EEU

Eýropa Unio, pere de sia agentejo EACEA pri civitanaj aktivecoj, subvenciis al Eýropa Esperanto-Unio (EEU) per 55.000 eýroj, por instalo de oficejo en Bruselo kaj dungo de unu oficisto. Nur 36 eýrop-nivelaj organiza¼oj inter 300 atingis subvencion. Tiu sumo kovras 80 % de la buøeto; la restanta 20% estos financata fare de la malavara japana mecenato Etsuo Miyoshi.



Fernando de Diego, protagonisto

La æi-jara OSIEK-konferenco en en Nova Gorica (Slovenio) de la 12a øis la 18a de julio 2008 havos kiel æef-temon la tradukiston *Fernando de Diego.* Dum la aranøo oni aljuøos la premion OISK pro kultura krea¼o nefikcia en Esperanto. La evento estas celita al fluaj parolantoj de esperanto kiuj deziras pliriæigi sian kulturon kaj esprimkapablon. La programon konsistigas precipe kursoj, prelegoj, interparoladoj kaj turisma vizito. Kontribuos Abel Montagut, Antonio Valén, Eugène de Zilah, Josef Dörr, Josip Pleadin kaj profesia aktoro Saþa Pilipovic.

Mallonge

La biblioteko de la mezlernejo Mar de Alborán en Estepona (Malago) kreis sekcion kun libroj en esperanto donacitaj de la asocio Marbordo de la Suno.

La astur-lingva ret-gazeto Gauzonia publikigas kurson de esperanto en tiu lingvo.www.gauzonia.info

la 26an de marto aperis artikolo pri esperanto en la valencia eldono de la senpaga ¼urnalo *Metro*

Novaj interretaj servoj en Æinio

Kiam la homa historio eniris en la 21-an jarcenton, ankaý la interreto enpaþis en novan eraon. Kun senæesa disvolvo de interreta teknologio, aperis multaj novaj a¼oj koncernantaj interreton. La interreta teknologio de Æinio disvolviøas preskaý en sama takto kun tiu de la mondo. Blogo, podkasto, surreta interþanøo, *witkey*, *pinker*, *wiki* ktp jam eniris en la vivon de popolanoj.

En 1987, Interreto eniris en Æinion kaj rapide disvastiøis en la 90-aj jaroj de la 20-a jarcento. Øis la fino de 2007, Æinio jam havis 172 milionojn da retumantoj kaj el ili 97 milionoj vizitis interreton per *larøa bendo*, la nombro de retumantoj kaj uzantoj de larøa bendo okupis la duan lokon en la mondo. Nun komputilo kaj interreto jam fariøis nemankigebla parto de la popola vivo, sed antaýe, nur fakuloj povis uzi komputilon kaj interreton.

Øojo pro surreta interþanøo

Surreta interþanøo estas interþanøo de a¼oj aý servoj per interreto. En Æinio ekzistas multaj specialaj retejoj, per kiuj oni interþanøas kun aliaj siajn objektojn ankoraý uzeblajn sed ne plu bezonatajn, tiel oni þparas ne nur monon, sed ankaý resurson por la socio.

Xiao Hong diplomiøos æe universitato en junio de la kuranta jaro, kaj registris sin en interþanøa retejo por interþanøi kun aliaj siajn librojn kaj notkajerojn pri lecionoj kontraý objektoj utilaj por la laboro. Post multfoja interþanøo fine þi havigis al si malnovan biciklon. Xiao Hong øojas pro sia sukceso kaj rakontis al siaj amikoj sian sperton.

Æe la Printempa Festo aý aliaj festoj, iuj kompanioj donacas al siaj dungitoj kestojn da fruktoj, aý sakojn da rizo, aý kestetojn da kuka¼o. Sed la homa bezono estas varia, do oni interþanøas ilin sur interreto kontraý preferata¼oj.

En Æinio funkcias retejoj ne nur por interþanøo, sed ankaý por malgranda interþanøa merkato. Precipe antaý diplomiøo de studentoj, la interþanøa merkato venas de nereala interreta mondo al realaj altlernejoj, kaj per tio oni povas akiri tion, kion ili bezonas per interþanøo. Krome, oni ankaý organizas similajn aktivadojn en multaj plansetlejoj de Pekino, tiel oni ne nur havigas al si bezona¼ojn, sed ankaý þparas monon kaj resursojn.

Pinker por faciligi la vivon

Pinker (nova vorto, kreita de æinoj) signifas, ke pluraj homoj kuniøas por kune plenumi unu aferon.

Sinjorino Zhang laboras en orienta Pekino, sed la infanøardeno de þia filo sin trovas en la okcidenta antaýurbo, malproksime de þia laborejo. Æiutage þi devis antaýtempe forlasi la laborejon por iri repreni la filon. Se okazis trafika þtopiøo aý malbona vetero, þi ofte malfruiøis al la infanøardeno, tio ne nur øenis la instruiston de þia filo, sed ankaý øenis þian mastron.

Sinjorinoj Lin kaj Wang loøantaj kun Zhang en la sama plansetlejo havis la saman æagrenon, kaj iliaj infanoj vizitas la saman infanøardenon. Do, sinjorino Zhang

proponis, ke ili tri laývice petu duontagan forpermeson por hejmen repreni la infanojn, poste restigu la infanojn hejme øis alveno de la aliaj du patrinoj por forpreni la infanojn. Tio ne multe malhelpas la laboron kaj samtempe øojigas infanojn.

Sinjorinoj Wang kaj Lin konsentis kun þi pri tio, kaj tiel komenciøis ilia *pinker*-vivo.

La sperto de sinjorino Zhang estas nur parto de pinker-vivo. Efektive, oni povas uzi pinker en multaj vivkampoj, ekzemple, iuj kune uzas la saman privatan aýton, dividante inter si la elspezon; aliaj — la saman favoran karton en aæetado por kune øui favoron de vendejoj; 10 retumantoj kuniøas aæeti samajn a¼ojn, kaj tiam la vendisto donas rabaton. Per *pinker* oni ne nur øuas oportunon kaj favoron kaj samtempe rikoltas øojon. Certe, oni ankaý kuniøas tiamaniere por kontribui al la publikaj interesoj.

La sperto de sinjorino Zhang estas nur parto de *pinker*-vivo. Efektive, oni povas uzi *pinker* en multaj vivkampoj, ekzemple, iuj kune uzas la saman privatan aýton, dividante inter si la elspezon; aliaj — la saman favoran karton en aæetado por kune øui favoron de vendejoj; 10 retumantoj kuniøas aæeti samajn a¼þojn, kaj tiam la vendisto donas rabaton. Per *pinker* oni ne nur øuas oportunon kaj favoron kaj samtempe rikoltas øojon. Certe, oni ankaý kuniøas tiamaniere por kontribui al la publikaj interesoj.

Solvi vian problemon per mia saøeco surrete

Witkey estas angla vorto, kiu signifas en Interreto vendi sian saøon por gajni monon. Laý nekompleta statistiko, troviøas en Æinio æ. cent tiaj retejoj.

Xiao Yan, 22-jara studento pri komputila teknologio lertas en glitado sur rulþuoj. Kvankam juna, li jam longe vigliøas tiukampe. Li registris sin en kelkaj famaj witkey-retejoj kaj vizitis interreton en libera tempo por seræi þancon. Iutage, iu retumanto diris, ke lia komputilo funkcias malrapide kaj rifuzas viziti interreton. Xiao Yan kontaktiøis kun li per la donita telefon-numero kaj solvis por li la problemon. Tiu retumanto pagis 100 juanojn (æ. 10 eýroj) al Xiao Yan. Kiam mi vidis Xiao Yan, li estis en glitado sur rulþuoj. Dum nia babilado, mi sciis ke li havas novan servon — kontroli la kvaliton de la nove produktitaj rulþuoj kaj fari raporton pri la ekzameno. Li diris: "Kvankam multaj homoj scipovas ludi sur rulþuoj, sed ne æiuj el ili kapablas fari la kontroladon, æar tio postulas fakan scion. Kaj mi þatas ludi sur rulþuoj de mia infaneco kaj konas multajn sciojn pri tio."


Mi vizitis unu el la retejoj prezentitaj de Xiao Yan, kaj trovis multajn servojn petatajn en tiu retejo, kiel ekzemple desegni emblemon por entrepreno; peti nomon por infano, solvi diversajn problemojn renkontitajn dum æiutaga vivo ktp.

En interreta mondo, blogo transservas kiel taglibro sur interreto; podkasto kontentigas aýdvidan bezonon de la popolo; per wiki retumantoj povas kune redakti vortaron surrete. Interreto alportas grandajn þanøiøojn al nia vivo. Æu vi konas kaj uzas tiujn servojn surrete?

Li Jianhua

Kongreso 2008

Kadre de la Internacia Jaro de Lingvoj, la temo de la Kongreso estos *Lingvoj, Trezoro de la Homaro, Iloj por Dialogo*. Vidu la interesan programon. La kongresejo estos la bela kaj centra konstrua¼o “Escuelas Aguirre”, antikva lernejo kiu nun funkcias kiel kultura centro “Centro Cultural Aguirre”.



Provizora programo

3an de julio (¼aýdon)

10:30 - Akcepto de la kongresanoj
12:30 - 13:30 Prelego *100-jariøo de Frateco* Lorenzo Noguero
14:00 -15:00 Manøo tempo
15:30 - 17:00 Ludotempo
17:00 - 18:00 - Baza kurso de Esperanto (Pedro Hernández)
- Ateliero pri poezio (Jorge Camacho)
18:00 - 19:00 Prelego
18:00 - 20:00 Interkona vespero kun prezento de kruda¼manøado (Beate Schneider)
20:00 - 21:00 Vespermanøo

4an de julio (vendredo)

08:00 - 09:00 Matenmanøo
09:30 - 10:30 Prezento de *Beletra Almanako* kaj de la lastaj Libroj de IEM
10:30 - 11:00 Solena malfermo de la Kongreso
11:00 - 12:00 *Lingvoj, trezoroj de la homaro, ilo por dialogo* Tonyo del Barrio
12:30 - 13:30 *La azia drako: vivo, kulturo, movado* de Augusto Casquero

14:00 - 15:00 Manøo tempo

15:30 - 17:00 Ludotempo
17:00 - 18:00 - Baza kurso de Esperanto (Pedro Hernández)
- Ateliero pri poezio (Jorge Camacho)
- Estrarkunsido de HEF
18:00 19:00 *Akvo, fonto de problemoj* (Rafaela Urueña)
19:00 - 20:00 Ludotempo
20:00 21:00 Vespermanøo

****

5an de julio (sabato)

08:00 - 09:00 Matenmanøo
09:30 - 11:00 - Øenerala Kunsido de HEF
- Libro-Servo (vizitebla dum la tuta tago)
11:00 - 12:00 - *Novaj tendencoj kaj servoj en la paøaro de HEF*
- Gazetara konferenco
12:15 - 13:15 *Eklipsas* de Miguel Fernández
14:00 -15:00 Manøo tempo
15:30 - 17:00 Ludotempo
17:00 - 18:00 -Baza kurso de Esperanto (Pedro Hernández)
-Ateliero pri poezio (Jorge Camacho)
18:00 - 19:00 Prelego de Antonio Valén
19:00 - 20:00 Prelego de Antonio del Barrio
20:00 - 21:00 Vespermanøo

****

6an de julio (dimanæo)

08:00 - 09:00 Matenmanøo
09:30 - 10:30 Fermo de la Kongreso
10:30 - 11:30 *Aliro al Cigana Romancaro* de Miguel Fernández
11:30 - 13:30 Konatiøo kun la urbo Kuenko
14:00 - 16:00 Manøo tempo
17:00 - 18:00 Adiaýo

Cetere povos kunveni HEJS, delegitoj de UEA; krome æiuj hispanaj sekcioj de faka asocio kunlaboranta aý membro de UEA, medicinistoj,SATeH, IKUE, KELI, ktp).

Aliøo al la Kongreso

Kotizoj (eýroj):

Normala: 35
Junulo (øis 25 jaroj): 30
Rabatoj: Membro de HEF: 5
10-opaj aý pliopaj grupoj: po 5

Kalkulu vian kotizon; ekz, se vi estas malpli ol 25-aøa kaj membro de HEFvia kotizo estos 25eýroj. Antaý ol pagi, vidu "Loøado". Se vi volas rezervi loølokon en la universitata restadejo, kalkulu ankaý la koston kaj sekvu la instrukciojn videblaj tie.

Pagu la kotizon (kaj eventuale la loøadon) en jena bankokonto:
Banco Santander Central Hispano 0049 4917 16 2696637046
(se vi estas en Hispanio)

Por pagi eksterlande bv. uzi jenan kodon:
Swift-Code: BSCHESMM
IBAN ES72 0049 4917 1626 9663 7046

Nepre indiku en la pagilo "Kongreso Kuenko" kaj la nomon de la pagantoj. Post la pago en la banko, sendu retmesaøon se eblas, aý poþtleteron, indikante la nomon de la paganto kaj la nomojn, retadresojn aý poþtadresojn de la aliøantoj kaj iliajn telefonnumerojn, urbojn, landojn kaj kotizojn pagitajn; se vi uzis rabato(j)n, bv. klarigi la kialo(j)n.

Sendu retmesaøon al "alejandro.pareja@gmail.com" aý poþtleteron al
Alejandro Pareja Rodríguez
C/Canónigo Muñoz y Soliva, 8
16004 Cuenca (Hispanio)

Post la sendo de tiu reta aý poþta mesaøo vi ricevos konfirmon de via aliøo enhavanta vian matrikulan numeron. Oni enretigos la liston de la aliøintoj kaj iliaj matrikulajn numerojn. Tiel vi povos certiøi pri via korekta aliøo. Se vi havus pli da demandoj aý problemoj, bv. sendi retmesaøon aý poþtleteron al Alejandro Pareja æe la antaýdiritaj retadresoj.

Loøado en la Kongreso

Por loøi en Kuenko dum la Kongreso estos du ebloj. La unua estas ke vi mem rezervu, telefone aý interrete hotelon aý hostalon por via restado... sed vi devos agi tuj! Estos granda alfluo de homoj en Kuenko dum la lasta semajno de junio kaj eble la sekvontajn tagojn, kaýze de konkursekzamenoj. Memoru ke la hoteloj “Don Quijote” kaj “Cueva del Fraile” staras en la æirkaýa¼oj, kelkajn kilometrojn el Kuenko... Ne uzeblaj se vi ne havas veturilon. Tamen “Cueva del Fraile” troviøas en vere bela natura loko.

Feliæe ekzistas nun dua eblo: Loøi en Universitata Restadejo “Residencia Universitaria Bartolomé Cossío”. Tio troviøas relative proksime el la kongresejo (15 min. piede) kaj eæ eblas ke multaj programeroj de la Kongreso okazos tie.

Ni povas aranøi la rezervojn por vi kaj proponi jenan grandiozan paka¼on!
* Loøado 3 tagojn (3-4-5an de julio)
* Æiuj manøoj (matenmanøo, tagmanøo, vespermanøo) ekde la tagmanøo de la 3a
* La tagmanøo de la 6an (dimanæo) estos ankaý inkludita
Æiu æambro havas banæambron kaj necesejon, kaj la restadejo posedas naøbasenon kaj aliajn utilajn servojn.
Tio kontraý la nekredebla prezo de 80eýroj!

Jen la kondiæoj:
* Ne plu restas unulitaj j æambroj en la universitata restadejo, nur dulitaj kaj kelkaj trilitaj.
* Eblos nur rezervi kaj pagi la loøadon kaj manøadon por la tuta periodo, eæ se vi ne uzos æion.
* Laý la regularo de la universitata restadejo ni devos prezenti liston de la nomoj de la loøontoj kun iliaj aøoj kaj la numeron de ilia DNI aý pasporto. Vi do devos sendi tiujn datumojn.
* La nombro de loølokoj estas limigita. Bonvolu rezervi ilin tuj!
por rezervi loølokon ne kontaktu la universitatan restadejon! Ni mem aranøos la rezervojn!

Se vi jam aliøis al la Kongreso, pagu denove 80 eýrojn æe la sama konto Nepre indiku “Loøado” kaj la nomo de la loøonto. Cetere, bonvolu sendi al mi, æu retpoþte æu per normala poþto, la datumojn de la loøonto: nomo, aøo kaj numero de la DNI aý paþporto.Se vi volas aliøi al la kongreso kaj pagi la loøadon samtempe, pagu la totalon (ekz. 35 + 80 = 115eýroj) kaj indiku en la pagilo “Kongreso kaj Loøado”.